

Numero: 254.  
Julio: 2013.

21-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

# VESPERTO



Redaktanto:  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár  
Béla király u. 44.  
H-7400 HUNGARIO  
Telefono: 82/ 410-664  
Retadreso: [espbela@t-online.hu](mailto:espbela@t-online.hu)  
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro  
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

# Sen Esperanto

- Kia estus la mondo sen Esperanto?
- Kiel homo, kiu estas surdmuta.
- Ĉu homo povas vivi sen Esperanto?
- Ĉu vi povus vivi sen aero?
- Ĉu bestoj povas vivi sen Esperanto?
- Ili ne bezonas ĝin, ĉar ili ĉie povas komprenigi sin.

Al mia vivo jam apartenas Esperanto. Mi jam ne povas vivi sen ĝi. Mi ankoraŭ estis infano, kiam mi ekkonis ĝin. Komence ĝi ŝajnis bona ludo kaj intense mi lernis la zamenhofan lingvon. Tiam ankoraŭ mi ne sciis, ke tiu ĉi „ludo” daŭros ĝis la fino de mia vivo.

Nun mia vivo estus vana, se mi devus vivi sen Esperanto. Tiu ĉi lingvo estas grandega fenestro tra kiu mi vidas la tutan mondon.

Esperanto estas facile ellernebla kaj krom tio ĝi estas internacia kaj neŭtrala. Eksterlande mi estus perdiĝinta sen ĝi. Tra la tuta mondo mi havas esperantistajn geamikojn.

Grandioze scii, ke mi havas komunikilon per kiu mi povas komprenigi min kun multaj homoj. Plu mi ne estas surdmuta eksterlande. Miaj esperantistaj geamikoj ĉiam helpas al mi kaj ankaŭ ili scias, sen Esperanto ili estus pli malriĉaj.


Ĉie kaj ĉiam mi provas konvinki miajn neesperantistajn geamikojn, gekonatulojn lerni ĝin, kaj ili kredis min, oni ne povas vivi sen Esperanto.

Antaŭ nelonge iu diris al mi, la angla lingvo jam superis la Internacian Lingvon, kaj la homaro ne bezonas ĝin. Sed mi scias, sen Esperanto baldaŭ neniu povos ekzisti. Ĝi fariĝos la dua gepatra lingvo de la homaro.

Ĝustatempe lernu ĝin kaj perfektigu vian lingvoscion! Eble morgaŭ jam estos malfrue, kaj oni mire demandas:

- Kiel vi povas vivi sen Esperanto?
- Sed se mi estos demandita, mi fiere respondas:
- Mi jam vivas kun Esperanto.

-Redaktanto-



# Hundoj

Hundo diras al la alia fiere:

-Mi komprenas la vokvortojn de mia domestro ankaŭ en Esperanto.

-Kio estas Esperanto? – demandis mire la alia hundo kaj malpacience atendis la respondon.

-Ĝi estas lingvo. Onidire ĝi estas facile ellernebla kaj jam milionoj parolas kaj uzas ĝin tra la tuta mondo.

-Do, vi komprenas du lingvojn. Ĉu ne?

-Jes.

-Interese, ankaŭ mi volonte ellernus tiun ĉi lingvon. Ĉu ĝi estas malfacila?

-Ne. Ĝin mi ellernis dum kelkaj horoj. Laŭ mi ankaŭ vi rapide povos ellerni. Nuntempe jam ankaŭ hundoj devas scii lingvojn.

-Mi konsentas. Tion mi ne komprenas, kial via domestro ellernis Esperanton kaj instruis al vi la vokvortojn? Kial li ne instruis al vi alian lingvon, kiu komprenas ankaŭ aliaj eksterlandaj hundoj?

-Laŭ mi jam ankaŭ Esperanto estas vaste disvasiĝanta kaj en la mondo multaj hundoj komprenas ĝin. Mi esperas baldaŭe ankaŭ via domestro instruos al vi vokvortojn en Esperanto.

-Ankaŭ mi ege esperas. Kiom bone estus se ni, hundoj ĉie en la mondo komprenus la diverslingvajn vokvortojn.

-Aŭskultu min amiko, tion deziras ankaŭ mia domestro. Li nepre deziras konvinki aliajn hundobredistojn; instrui Esperantajn vokvortojn al siaj kvarpiedaj amikoj. Mi tre esperas, en iu tago li konvinkos ankaŭ vian domestron kaj tiam vi scios la gravajn vortojn.

-Belega estonto! – ekĝemis la alia hundo kaj revante rigardis malproksimen. En liaj okuloj ekbrilis la espero.

Ili mutiĝis kaj senmove kuŝis en la ombro de granda arbo. Ili ambaŭ pensis pri estonto, kiam ĉiu parolas kaj komprenas tiun ĉi grandiozan helplingvon. Falos la lingvaj bariloj. Malaperos la lingvaj miskomprenoj kaj oni ne devos atendi surdmute ĝis iu tradukos la gravajn vokvortojn. Nun en ĉiu lando fremdvorte vokas la hundojn la domestroj. Espereble tio jam ne daŭros longe.

-Ŝaŝa-



## LA SAMAN TAGON EN LA SAMA URBO

### II-a parto

Verkis Miric Jadranka

Elkrepuskiĝis.

Sabina vekigis frumatene pro forta kapdoloro . Tuŝante la frunton ŝi fingre frotetis sian tempion. Nigra hararo malorde pendis laŭ la brusto.

Sur nudaj piedojn ŝi surmetis ĉifonajn pantoflojn. Nur kotona blanketa noktoĉemizo kun violaj floretoj aspektis bonkvalita, iom luksa. Kaj multekosta. Kiel ĝi ne estus alloga ? La onklino sendis ĝin el Francio, kiel donacon por ŝia pasintjara naskiĝtago.

- Avinjo``, Avinjoo - ekkriaĉis ŝi alvokante la avinon Jana .

- Ĉu mi aŭdas mian karan ŝafidon? - mola voĉo atingis orelojn de Sabina. Ŝi etendiĝis siajn manojn kurante al avinjo Jana.

Sinjorino Jana estis sesdekjara. Ekde neatendita morto de ŝia filino ŝi tutkore prizorgis siajn du genepojn. Ilia patro forlasis ilin iom post la morto de sia edzino. Li diris ke li iros eksterlanden por labori kaj ke li revenos. Sed pasis jaroj kaj de li venis nek spuro nek voĉo .

La geknaboj rapide kreskis kaj jam eniris lernejon. La avinjo Jana familiariĝis kun pli juna najbarino nehavanta infanojn. La juna najbarino loĝis je du domoj de la ŝia. Tiel ŝi estis preskaŭ ĉiutage kara gasto en ilia modesta domo.

- Avinjo, kie vi estis?- alvokis Sabina la avinjon .

- Ne, timu, mi estas tie, kun vi. - Kial vi frue ellitiĝis? - zorgeme demandis la avino la knabinon kun ekzamena rigardado vizaĝon de Sabina por ekkapti eblan miensignon.

- Mi havas kapdoloron - diris Sabina mallaŭte. Mi ne vizitos la lernejon hodiaŭ. Post mallonga paŭzo ŝi diris iom gaje.

- Milena bone kaptas ĉion skribitan sur la tabulo, tiel mi morgaŭ certe reskribos ĉion. Sabina estis konvinkinta en sia bona elekto.

- Bone. Ĉu vi volus ke mi surmetu sur vian frunton tuketon kun dispecigitaj terpomoj?.....Kaj tuj eltrinku la glason da lakto. Venu kun mi en la tagĉambro kaj kuŝu tie. Mi revenos post kvin minutoj - diris milde la avinjo, malfermante la pordon de tagĉambro unumane.

Tiam eksonoris sonorilo sur la dompordo. La dompordo estis malŝlosita kaj juna najbarino eniris en la malgrandan koridoron. Ekvidinte la kuŝantan knabinon ŝi zorgeme demandis ŝin.

- Sabina, ĉu vi estas malsana ?

- Ne, sed mia kapo tre doloras .

- Eble vin kaptis akra vento hieraŭ blovanta dum nia neĝjetado - konstatis la najbarino.

- Mi deziris inviti vin kaj vian fraton Rade viziti skiterenojn en Kraljevica arbarparko - ŝi gaje aldonis.

- Ĉu estas instruktoro por skiado?

- Mi estis sciigita ke la lastaj du instruktoroj ekvojaĝis al montara domo por subteni ``Lernejon en naturo.``

- Ĉu la nuna skipado estas facila, kaj sendanĝera?` plue demandis Sabina scivoleme.

- Tie troviĝas skilifto kaj la pado ne estas onda.

- Multaj infanoj ĉiutage venas por skii kaj ili preskaŭ ĉiuj havas propran skiistan ekipaĵon.

- Eĉ oni povas lŭi ĝin, ĉu ne? - jesante pli ol demandante diris Sabina.

- Mi vidas, ke via kapdoloro pasis. Interesa parolado kiel bona medikamento - ride diris junulino al eniranta avino Jana.

- Avinjo, mi petas vin, malfermu la fenestron. Mi sopiras pri la freŝa aero. La korto kaj ĝardeno estas belaj .La heleboro jam ekfloris .

- Jes, vere . Ankaŭ mi ĵus plukis la bukedon por vi Jana, - diris la najbarino montrante la florbukedon tenanta enmane. Nu, bonvolu meti ĝin en la vazon sur la tableto.

Intertempe Rade ellitiĝis kaj tuj post finita matena dentobrosado li eniris en kuirejon por matenmanĝi.

- Mia avinjo estas la plej bona avino en la mondo. Ŝi preparis pomapasteĉon.

Hm..mmmm , ĝi estas bongusta flarante la kuketojn

- li afable diris. - Bonvolu akompani min!

Subita bruego kaj rekonata sonoro de fajrobrigadista ruĝakamiono ektimis ĉiun. Samtempe ili eksentis fortan fumodoron. Ĉiuj ekkuregis eksteren.

El ĉiuj apudaj domoj homoj amasiĝis en la strato provante kompreni kio okazis al ilia najbaro Jovo. Baldaŭ la vortoj, kvankam kriaĉeme elbuŝigitaj estis pli klare komprenitaj.

Nome, la urba ĉionscianta, mezaĝa s-ino Marina ankoraŭ kriaĉante klarigis la okazaĵon.

- La viro ĉirkaŭ sepdek jaroj aĝa endormis forgesinte estingi la fumitan cigaredon kaj la cigaredo falis sur gazeton troviĝanta sur planko ekflamigite la gazeton. Li estis malsana kaj solulo en la dometo kaj la fajro rapide, kiel serpento rampis laŭ malmultnombra meblaro kaŭzinte la grandegan fajron. Feliĉe, la urba, fajrobrigadistoj rapide atingis la dometon kaj savis la maljunulon de certa morto Ili sukcesis estingi la fajron antaŭ ol ĝiaj ardeĉaj langoj ne alglutis la tutan dometon - Marina finis sian klarigon .

(daŭrigota)

# Pri imaga vojaĝo

-Fantasta vojaĝo-

XI.

Mi estis en ĝena situacio. Mi ekprovis trankviligi min, eble ĝi estas nur sonĝo kaj matene vekigante rapide mi forgesos ĉion.

Sinjoro Esperulo parolis kaj parolis senhalte. Verdire mi jam ne memoras pri kio. Ĝi ne tro interesis min. En miaj okuloj li estis frenezulo kaj estas pli bone lasi tiajn homojn.

Mi ne scias kiom longe ni atendis en la salono. Subite laŭta trumbonosono interrompis nian idilan babiladon. Dum tio la salono pleniĝis kun homoj. Ŝajne ili ĉiuj estis ekscititaj. Laŭ mi ankaŭ ili estis novalvenintoj. Ili tremante sidadis sur la seĝo. Multaj el ili timis ekparoli, eĉ kelkaj larmis.

Nun jam efektive mi ne komprenis, kio okazis? Mi frapetis mian vangon por ke mi vekigu. Sed mi ne vekigis. Mi plu restis en tiu stranga, giganta salono kun la multaj samsortuloj.



-Moŝta grafo Bonfarulo! – aŭdiĝis baldaŭe el la buŝo de ceremonestro.

En la salono iĝis silento. Ĉiu mutiĝis kaj ĵetis rigardon al la pordo.

Post kelkaj sekundoj ekaperis la grafo Bonfarulo en eleganta, neĝoblanka kompleto. Sur lia kapo estis same blanka toloĉapelo. En lia mano estis promenobastono. Lia tuta memo radiis estimon kaj trankvilon.

Mi konfesas, ekvidante lin ankaŭ mi iomete trankviliĝis kaj laŭ mi ankaŭ la ĉeestantoj.

Li iris al granda marmora tablo kaj restinta staranta li diris al ni:

-Estu bonvenitaj sur mia mirakla insulo! Mi venigis vin ĉi tien por montri al vi alian pli belan mondon, ol kion vi ekkonis ĝis nun. Mi tre esperas, neniuj koleras, kial vi estis forrabitaj. Sed komprenu min, tiutempe tio estis la unusola eblo, ĉar el ili neniuj estus kredinta al mi antaŭ la ekiro. Ĉu ne?

En la salono multaj homoj jesis. La grafo daŭrigis. Intertempe agrabla muziko estis aŭdebla kaj florodoro ŝvebis en la aero. Ĝi estis tre bona kaj hejmea.

-daŭrigota-

# Poezio

BLEKA RIVELO

Dum kiel blindulo migranta sen gvid',  
mi paŝis al nova kontesto  
al majstro de saĝo, mi petis kun fid'  
rivelu la sencon de l' esto.

Sed li min observis en plena silent',  
kaj ŝajnis eterna la pena moment'.

Mi triste ekpensis — probable li nun  
aludas per muta respondo  
la vanton de ĉiu spirita komun'  
kaj fundan ĥaoson de l' mondo.

Do ĉiu scienco nur estas miraĝ',  
kaj vanas naivaj pretendoj de l' saĝ'.

Sed tremis senile la sulkoj de l' buŝ',  
descendis la barba makzelo,  
kaj kvazaŭ per iu sinistra retuŝ',  
ekŝajnis simia muzelo.

Kaj sonis etende ĉu muĝo, ĉu mek' —  
la fama pensulo respondis per blek'.

Mi staris ŝokita, kaj sento de spit'  
sin naskis en flagra kolero:

jen kia li estas, sagaca spirit'!

Jen — glora heroldo de vero!

Kaj kiel defio resonis en mi  
la bleka rivelu de l' dokta simi'.

Ruso. Naskiĝis en 1955 en urbeto Rognedino. Diplomiĝis en la Instituto de fremdaj lingvoj en Niĵnij Novgorod. Ĵurnalisto kaj tradukisto. Ekde 1988 membro de la demokratie orientita asocio Solidaro. Partoprenis en la eventoj de la periodo de l' perestrojko. En 1990-1994 deputito de la regiona konsilio, ĉefo de ties informa komisiono. Aŭtoro de poemoj, noveloj, recenzoj kaj eseoj, aperintaj dise en Sezonoj, Literatura Skatolo, La Ondo de Esperanto kaj Literatura Foiro. Loĝas apud Kaliningrad.



# Por infanoj

## Manja, kato kaj la eta birdo

Manja malsaniĝis kaj dum la tuta tago ŝi devis kuŝi en la lito. Bonŝance ŝia kara ronrolanta amiko estis kun ŝi. Fidele ĝi estis apud ŝi kuŝante sur la tapiŝo. Sed se Manja deziris, ĝi volonte ludis kun la knabino. Ili tre ŝatis unu la alian. La kato helpis ankaŭ la resaniĝon.



En iu tago okazis, eta birdo flugis sur la branĉon de proksima arbo kaj de tie ĝi enrigardadis la ĉambron.

Kiam la kato rimarkis la birdon, ĝi fariĝis tre eksitita. Ĝi tuj kuris al la fenestro kaj tie ĝi kaŝrigardis la etan birdeton. Certe ĝi revadis kapti ĝin. Kiom bonega amuzo estas ĉasi birdon, sed nun tio ne estis ebla.

-Mia kara kateto, kion vi rigardas? - demandis Manja kaj ankaŭ ŝi iris al la fenestro.

Surpriziĝante ŝi vidis, sur la branĉo eta birdo sidas kaj kantas. Al ŝi tre plaĉis la birdotrulado, alifoje ŝi estus larĝe malfermita la fenestro por ke ŝi aŭdu pli bone ĝian kanton, sed nun ŝi timis la etan birdon de la kato.



La kato ofte alrigardis la knabinon, kvazaŭ ĝi estus petita: Bonvolu malfermi la fenestron kaj lasu kapti al mi tiun plumaran beston.

Manjo tion ĝuste ne deziris. Al ŝi plaĉis la birdokanto kaj ŝi tre bedaŭrus, se ĝia kariero finiĝus en la buŝo de la kato.

-Ne pensu pri tio, ke nun mi malfermos la fenestron - ŝi diris al la sopireganta besto, kiu glutadis triste.

Dume la eta birdo nur kantis admirinde. Ĝia voĉo estis ĝuebla ankaŭ tra la fermita fenestro.

Nur la kato koleris kaj la fermita fenestro ne plaĉis al ĝi.

La knabino rapide resaniĝis. En iu printempa tago ŝi decidis iri al la proksima kampo kun sia kato.

Brilis la suno kaj ĝiaj radioj karesadis ilin. Estis tre belega, printempa tago.



Dum la ekskurso ili admiris ĉiun floron kaj kreskaĵon. Fine ili alvenis al arbusto. Tie ili ekripozis. Sidante sur la velura herbaro la kato tuj ekdormis kaj Manja revante rigardis la bluan ĉielon.

La kato povis dormi nur mallonge. Subite inter la branĉoj de la arbusto konita birdokanto eksonis. Kvazaŭ ĝi jam estus aŭdinta.

La knabino eklevis sian kapon, sed ĉefe la kato iĝis tre ekscitita. Ĝi jam deziris salti por kapti la etan birdon. Bonŝance Manjo sukcesis reteni ĝin.

-Kara mia kateto, lasu tiun birdon! Ĝi estas nia amiko. Ĉu vi rememoras, ĝia kanto resanigis min antaŭ semajnoj.

La vortoj de la knabino malgajigis la katon. Ankaŭ nun por ĝi estas malpermesita la birdoĉasado. Kia mondo estas kie kato ne povas ĉasi birdojn?

-Manjo, mia kara mastrineto, permesu al mi la ĉasadon! Nur unufoje mi eksaltos kaj kaptos ĝin. Ĉu bone?


La knabino kolereme diris al ĝi.

-Mi tre koleras pri vi. Ĉu vi ne hontas ĉasi tiel belege kantantan birdon? Se tiom pelas la ĉasemo, vespere iru en la nutrajkameron por kapti la musojn!

Sed tio ne plaĉis al la kato. Ĝi ion murmuris sub sia nazo kaj fine ĝi trankviliĝis.

Ankoraŭ iomete ili aŭskultis la kanton de la eta birdo kaj kiam ĝi mutiĝis ankaŭ ili ekiris hejmen, kie Manjo rakontis sian travivaĵon kun la eta birdo al sia patrino.

-Onklo Adalberto-



# Piramidoj



# Piramidoj

